

Avantaĝoj kaj limoj de la gesta instruado
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-801/248, 1979 februaro 15, 17

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Dum la du pasintaj elsendoj mi faris rapidan prezenton de la gesta lingvo-instruado, kiun mi havis la okazon eksperimenti dum pli ol unu jaro kun dekjaraj infanoj. Kiam la gelernantoj estas lacaj post matena studperiodo, montriĝis ke ili ankoraŭ kun entuziasmo sekvas esperanto-kurson, kiam la instruado disvolviĝas geste. Tio signifas, ke oni rezignas je la klasika situacio: sidado en klasejo kaj studado pere de lernolibro. La kurso disvolviĝas ekzemple en gimnastikejo, kie la instruisto agas kaj priskribas siajn agojn kaj invitas la gelernantojn fari la samon: "Bonan tagon! Mi salutis vin. Salutu min! Mi sidiĝas. Ankaŭ sidiĝu! Mi metas miajn manojn sur mian kapon. Ankaŭ metu viajn manojn sur vian kapon! Mi stariĝas. Ankaŭ stariĝu! Mi saltas trifoje. Ankaŭ saltu trifoje! Mi rakontas ĉion, kion mi faris: mi salutis; mi sidiĝis; mi metis miajn manojn sur mian kapon; mi stariĝis; mi saltis trifoje. Kiu povas rakonti, kion li faris? ktp.

A.- Tiu ĉi gesta instruado prokrastas la skriban kaj legan instruadon ĝis kiam la parola uzo de la lingvo estas bone asimilita. La lingvaj ekzercoj generale disvolvigas sub la formo de kolektivaj, grupaj aŭ individuaj ludoj movplenaj. En ili la prokrastitaj ordonoj ludas ĉefan rolon. Tio signifas, ke la instruisto priskribas, kion ĉiuj aŭ diversaj grupoj devos fari post certa startsignalo. La gelernantoj devas streĉi sian atenton por kompreni kaj memori la ordonon, kiun la instruisto dufoje ripetas. Dum la plenumado de la ordono la gelernantoj astempe rakontas, kion ili faras. poste ili istempe tion rerakontas.

Cl.- Vi vin demandas, kiel la lingvaj korektoj efektiviĝas? Tio estas tre simpla kaj tute sistema. Ekde la unua leciono estas uzata la konfirma ripetado. Tio signifas, ke post la respondado de la gelernantoj la instruisto ripetas ĝustaforme taŭgan respondon, kiun ĉiuj rediras. Tiel la gelernantoj povas aŭtomate korekti sin aŭ ricevi la konfirmon de la ĝusteco de la propra respondo.

A.- La lega instrufazo estas tiel enkondukita. Iom post iom certajn ordonojn la instruisto ĉesas doni parole. Ilin li disdonas skribe al la plej lertaj gelernantoj, petante laŭtleĝon. Tiel grupe aŭ individue, sub la kontrolo de kamarado, tiuj ĉi ordonoj estas deĉifritaj kaj efektivigitaj. Ili kondukas al precizaj situacioj: serĉado de bildoj fiksotaj sur la flanelan tabulon, disdono de aliaj bildoj aŭ objektoj, transdono de ordonaj slipoj, de bildoj aŭ objektoj, pretigo de mimoj, skeĉoj aŭ de konkursoj.

Cl.- Tiaj ekzercoj, kie la skribaj ordonoj anstataŭas la parolajn ordonojn, permesas iompostioman studon de la skriba lingvo. Helpe de tipaj vortekzemploj la karakterizaĵoj de la esperanto-fonetiko estas perslipe demonstreblaj, sed nur konvena legado estas la celo. Kiam la gelernantoj skribe respondas, plej fantaziajn transskribojn la instruisto akceptas. Dekjaraj infanoj malrapide rimarkas la malsimilecojn inter la skrib-reguloj de la gepatra kaj esperanta lingvoj. Estas bone alporti klarigojn nur kiam iu faras precizan demandon. Tiucele estas bone posedi slipojn fiksotajn sur la flanelan tabulon, kiuj permesos al la koncerna lernanto klarigi al la aliaj, kion li malkovris.

A.- Nia eksperimento pruvis, ke per dudek minuta instruperiodo semajna bazita sur la gesta instruado, oni atingas rapide kontentigajn rezultojn, se alian semajnan samlongan instruperiodon oni povas dediĉi al la aŭdvida instruado. En unu jaro la gelernantoj atingas lingvan komprenon, kiu permesas la instruadon de lerneja fako en esperanto. Sed ni bone konsciu pri la limoj de la gesta instruado. Kiel vi ĵus aŭdis, ĝi rezignas je la skriba instruado. Ĝi metas la akcenton je la parola uzo de la lingvo, tre atentante je la ĝusta elparolo, kio fakte estas tre pozitiva faktoro ĝenerale neglektata en la lernolibra instruado.

Cl.- La limoj de la gesta instruado estas dependaj de la metodologia formado de la instruisto. Li devas tre precize koni la plenumotan programon. Lia aŭtoritato kaj lia imagpovo ludas ĉefan rolon: nenio povas efektiviĝi en tumulto kaj la tipajn ekzercojn oni povas senlime vari. Kiam la gelernantoj komencas inventi novajn situaciojn, tiam la instruisto devas tamen resti la lingva modelo. Tio signifas, ke li ne devas timi interveni, por korekti ĝeneraliĝantajn erarojn prononcajn aŭ gramatikajn. Sed tiu ĉi interveno korektiga ne devas malkuraĝigi la gelernantojn mem agi. Certa lingva toleremo estas necesa, se la agemon oni ne volas mortigi.

A.- La gesta instruado ĉesas profite al la asimilado de skeĉoj kaj teatraĵetoj, kiam la plimulto de la gelernantoj preferas la skribajn ordonojn al la parolaj. Tiu ĉi prefero iom post iom montriĝas, kiam la baza vortaro kaj la ĉefaj gramatikaj reguloj estas asimilitaj. Tio signifas, ke la gesta instruado post unu jaro de praktiko iom post iom cedas la lokon al aliaj instrufazoj.

Cl.- La gesta instruado tutcerte plenumas liberigan rolon. Tial ĝi estas tiom fruktodona. Tiu ĉi instruado, plej ofte kolektiva, baziĝas sur la korpa movo, kion tre ŝatas la infanoj kaj ankaŭ la plenkreskuloj. Tial ĝi estas produktiva fine de instruperiodoj, kiam la sida instruado ĉesis efiki.

A.- La memorado estas mensa fenomeno ligita al la ludo de la muskoloj. Vortojn oni ekzemple pli longe kaj precize memoras, se oni ne nur legis ilin, sed ankaŭ ilin diris kun la korespondaj gestoj. Frazojn, kiujn oni mimas, oni pli profunde komprenas kaj asimilas, ol se oni nur legas aŭ aŭskultas ilin.

Cl.- Cetere por konvinkiĝi ke la lingva fenomeno estas intime ligita al korpomovoj, sufiĉas rigardi grupon konversacii. Dum kelkaj nur perlipe parolas, la plimulto parolas per la tuta korpo: la vizaĝo, la brakoj, la gamboj eĉ moviĝas. Ju pli junas la parolanto, des pli tiu ĉi fenomeno estas videbla. Infano estas la besto aŭ la veturilo, kiun li priskribas. La aktoroj konservis tiun kapablon enkorpiĝi rolojn, el tio ilia talento kapti la atenton de la publiko.

A.- Dum la venonta somero la semajnon post la universala kongreso mia edzo Claude Gacond gvidos kurson en la kadro de Internacia FERIA Altlernejo, kiu estos dediĉita al enkonduko al la aŭd-vida kaj gesta instruado. Interesatoj petu informilon tra la kanalo de Svisa Radio Internacia.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. La venontan semajnon ni parolos pri la ekspozicio pri Esperanto kaj Interlingvistiko en Svislando, kiu estas vizitebla ĝis pasko en la Nacia Biblioteko en Berno. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gracond. Ĝis reaŭdo!